



Novjorka Prismo

Numero 98

Novembro 2000

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia novembra kunveno

DATO: Vendredon, la 17-an de novembro 2000, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – Raporto de la kandidatiga komitato.
– Ni rigardos la filmon ...

Incubus

... kaj poste diskutos pri ĝi. ★



Raporto pri la Malfermita Domo de la 20-a de oktobro 2000

Je 7:02 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis nian Malfermitan Doman (Open House). Ni havis multajn neesperantistajn gastojn: kvar personoj el Kolombio, du personoj el Ganao, kaj unu persono el Brazilo.

Tomaso anoncis, ke li sendos e-poŝton al ĵurnalo, kiu eldonis reklamon pri la Malfermita Domo, pri la fakto, ke estis faktaj eraroj en ĝi.

Tomaso faris paroladon, respondante al ofte faritaj demandoj pri la Movado kaj la historio de Esperanto, kaj pri la lingvo mem.

Rochelle F. GROSSMAN deklamis sian ŝercon pri la muspatrino, kiu forigis katon per sia uzo de la hunda lingvo.

Arnold VICTOR parolis pri kiel trovi kaj uzi Esperanton ĉe la Interreto. Li diskutis pri paĝoj, pri tiparoj, kaj eĉ pri radioprogramoj troveblaj per la Tut-Tera Teksaĵo.

Je 7:33 ptm, ni komencis rigardi vidbendon de la televidprogramo, en kiu Steve Allen intervjuis Bill Harmon pri Esperanto.

Je 8:04 ptm, Leonardo DZELZITIS parolis pri siaj spertoj, kaj pri kiel Esperanto ŝanĝis sian vivon.

Rochelle parolis pri la frua historio de la Movado.

Kelkaj personoj montris ekzemplerojn de libroj kaj ĵurnaloj en Esperanto.

Marta BERGONZOLI parolis pri siaj spertoj ĉe la kunveno en Okemo, Vermont.

Nijl BLONSTEIN parolis pri siaj vojaĝoj

en Esperantujo dum la somero. Li iris al kelkaj landoj en la Meza Oriento.

Tomaso donis mallongan version de sia unua Esperanto-leciono.

Je 8:42 ptm, Tomaso oficiale fermis la Malfermitan Doman.

Tuj poste, Nijl kondukis la ĉeestantojn en la kantado de "Marijana".

Fine, Tomaso invitis la ĉeestantojn iri al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★

Protokolis: Stuart GREEN

VIVERETO de Tomunko



"La Kriego"

Estrara kaj neformala kunvenoj

Dimanĉon, la 5-an de novembro je tagmezo komenciĝis estrara kunveno ĉe Sony Plaza. Inter la decidoj estis: ĉiujare ni elsendos leteron anstataŭ la septembra *Prismo* al tiuj, kiuj lasis sian abonon finiĝi; ni provas trovi alian klubkunvenejon liberan dum alia tago krom vendredo; ni esploras trovi "taxpayer id" por havi malpli multekostan bankkonton; ni okazigos aŭkcion dum februaro por forvendi la librojn, kiujn Julius Manson postmorte donacis al nia klubo.

Post la unua horo okazis la kutima neformala kunveno, en kiu ni diskutis pri la venonta usona elektado. Ni ankaŭ voĉdonis pri kiu verŝajne gajnos: la grupo plejparte opiniis, ke Gore gajnos – bedaŭrinde oni ankoraŭ ne scias ĉu ni pravis! ★

**SONY
PLAZA**

– Tom ECCARDT

Libroaŭkcio!

Dum la februara kunveno, oni forvendos la librojn, kiujn Julius Manson postmorte donacis al nia klubo. Vidu la malsupran liston, kiu indikas la kvanton de ĉiu titolo. Vi rajtas proponi prezon aŭ persone ĉe la februara kunveno, aŭ poŝte per sendi paperan oferton al:

Thomas Eccardt
455 East 14th St. #3-C
New York, NY 10009

Aŭ sendu vian proponon e-poŝte al "teccardt" ĉe hotmail.com. La homo, kiu ofertas la plej altan prezon aĉetos la libron. Ni anoncos la paperajn ofertojn post la aŭkcio de ĉiu libro. La klubo ne scias la valoron de la libroj. Limdato por paperaj ofertoj estas la 1-a de februaro 2001. ★

- Tom ECCARDT

- # Titolo
- 2 Baza Literatura Krestomatio [Hung. Esp. A.]
- 3 Paŝoj al Plena Posedo [Auld]
- 3 A Practical Course in Esperanto [Szilagy]
- 3 Esperanto - Learning and Using the International Language [Richardson]
- 1 Teach Yourself Esperanto, New Ed. [Cresswell & Harile]
- 3 Step by Step in Esperanto [M.U. Butler]
- 1 Virino ĉe la Landlimo [Boulton]
- 1 Faktoj kaj Fantazioj [Boulton]
- 2 Plena Ilustrita Vortaro [SAT]
- 1 Plena Vortaro (poŝa versio) [SAT]
- 3 Esperanto: The World Interlanguage [Connor]
- 1 Nova Testamento
- 2 Sankta Biblio
- 2 Esperanta Legolibro, 187pp [Migliorini]
- 1 Originala Verkaro (iom malbona kondiĉo) [Zamenhof]
- 1 Kalevala (fina epika poemo)
- 1 Historio de la Mondlingvo (1931) [Drezen]
- 1 Esperanta Antologio - Poemoj [Auld]
- 1 Fundamento de Esperanto [Zamenhof]
- 1 La Stranga Butiko (Poemo) [Schwartz]
- 1 A Short History of the International Language Movement [A.L. Guerard]
- 1 Historio de la Lingvo Esperanto (2nd vol only) [Privat]
- 1 Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto [Wells]
- 1 Esperanto 1, Internacia (basic course in Esperanto only) [Szerdahelyi]
- 1 Esperanto in the Modern World [Eichholz]
- 1 Esperanto En Perspektivo [Lapenna]
- 1 Tra la Jaro - Esperanta Lernolibro (1914) [Waddy]
- 1 English-Esperanto Dictionary (1921) [Fulcher & Long]
- 1 Plena Analiza Gramatiko [Kalocsay-Waringhien]

He/She/They - Ho Ve!

La angla ekhavis problemon antaŭ kelke da jardekoj kaŭze de la feminisma movado. *He* ne plu povas esti uzata kiel komungenra pronomo, ĉar tio ŝajnas ekskludi la inojn. Oni de tiam devis uzi *he or she* aŭ, parole, *they*. Sed tio vere fuŝis la anglan, ĉar *he or she* estas tre peza kaj *they* estas plurala pronomo, kiun oni penas uzi singulare. Ekzemple, mi laste legis e-poŝtan mesaĝon, ke oni iĝu mentoro al junulo (nomita *a mentee*). Ĉe la fino, la mesaĝo tekstis: "Enjoy the wonders of your mentee as he/she discovers abilities he/she never knew they had." Ŝajne tri *he/she*-oj estus jam tro multe kaj la skribinto rezignis pri ĉi tiu rimedo kaj uzis *they* por la tria.

Sed Esperanto estas precize kiel la angla ĉi-rilate. Kaj efektive, en mia legado, mi jam vidis unu kazon de la uzo de *li aŭ ŝi*, por resendi al la substantivo *leganto*. Sed, kiel en la angla, eventuala ripetado de ĉi tiu vorto-grupo multe da fojoj en unu frazo aŭ para-grafo efikus tre tede. Ĉu ĉi tiu lingvuzo estas vere necesa?

Feliĉe, Esperanto estas tiel logika lingvo, ke ĝi povas esti ĉiam regata de la logiko, kaj la vortuzado de individuaj personoj, kiu ne estas ĉiam tute ĝusta pro eventualaj politikaj celoj, ktp., ne povas fari decidigan efikon sur ĝin. Kaj la logiko montras, ke *li* sufiĉas kiel komungenra vorto de la tria persono singulara. Nenia alia vorto estas necesa por transdoni la deziratan signifon.

La signifo de vorto estas determinata de ĝia uzado. Se *li* estas uzata por resendi al komungenraj vortoj kiel *homo*, *leganto*, *infano*, *instruisto*, ktp., tiu pronomo iĝas komungenra. Oni povas vidi ĝin kiel komungenran pronomon, kiu ankaŭ povas esti uzata por virseksuloj, anstataŭ la (kutima) malo, kiel virseksan, uzatan ankaŭ komungenre. Ĉu oni ne povas konsideri ĝin nur pronomo por indiki homon kontraste al nehomino (besto, planto, aŭ aĵo)? *Ŝi* estas ankaŭ tia pronomo, uzata por ineksaj homoj, kaj estas do anstataŭaĵo por "*li-in-i*". Kiam oni deziras distingi ineksulon disde virseksulo, estas tre oportune havi apartan pronomon - kiu mankas en kelkaj lingvoj (ekzemple, la tagaloga, la ĉina, kaj la hungara) - sed estas nenia bezono de tria por konsideri nur al virseksuloj. Rimarku, ke la plurala pronomo de la tria persono, klare komungenra, estas *ili*, tre simila al *li* - indiko de la genio de Zamenhof.

Se *leganto* povas esti aŭ virseksa aŭ inek-

Societa kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Novembro 17

ESNY Kunveno: - "Incubus"
Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

Free Beginners' Esperanto Class
continues at Stuyvesant Adult Center
Mondays, 6:30-8:00 pm

Decembro 3

Tagmanĝo
Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe SONY Plaza
(Limdato por kontribuajoj por Prismo 99)

Zamenhofa Festo 15

Friday, 6:30 pm at UFT

Januaro 1.1.1

Limdato por kontribuajoj por Prismo 100

- United Federation of Teachers (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)
- SONY Plaza Atrium
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium
- Stuyvesant Adult Education Center
345 East 15th Street (1st/2nd Avenues) NYC
Fourth floor, room 411

sa, *li*, kiam uzata por resendi al ĝi, povas ankaŭ esti tia. Tio ankaŭ taŭgas por *reader* kaj *he*, sed estas jam tro malfrue savi la anglan! ★

- Maurice WITTENBERG

Festa Prismo

Ĉu vi ankoraŭ ne kontribuis al la festa Prismo? Kial ne?

En januaro, ni publikigos grandan numeron de *Novjorka Prismo* por memorfesti ĝian 100-an numeron, la novan jarmilon, la nov-jorkajn bazpilkajn teamojn, ktp. Via artikolo, raporto, rakonto, bildo, foto, ktp. NE devas temi rekte pri *Prismo*. Sed ĉar ni volas publikigi grandan numeron, se vi iam ajn konsideris verki ion por *Prismo*, bonvolu sendi vian kontribuadon baldaŭ. La limdato estas la unua de januaro! ★

- Tom ECCARDT

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO			Novjorka Prismo		
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017			Numero 98 - Novembro 2000		
(212) 687-7041			ISSN: 1059-5627		
			http://members.aol.com/novjorka/prismo		
Prezidanto	Korespondanta Sekretariino	Protokolisto	Redaktoro	Subredaktoroj	Desegnistino
Thomas Eccardt	Rochelle F. Grossman	Snarr Green	Jim Medrano	Thomas Eccardt	Mary Pulley
(212) 477-6516	(718) 457-1490	(631) 751-5683	(212) 982-5029	Nancee Medrano	
Vicprezidanto	Kasistino	Program-Direktoro	Sendu kontribuojn al:		
Arnold Victor	Sofiya Soskina	Alex Karkovsky	Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103		
(212) 645-3794	(718) 671-5699	(718) 769-7255	e-poŝto: jimmedrano@mac.com		
			© 2000 Esperanto-Societo de New York		